# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-15 n-ro 417

## Honduro: streĉiteco daŭras



Tunizio: flava karto adresita al la registaro

Domo de vic-reĝo aŭ Kiom kostas sendependeco?

Nek pedalo, nek stirrado – jen la aŭtomobilo Cruise AV

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

## Honduro: streĉiteco daŭras
*Kontraŭ-ribelaj policistoj kaj manifestaciantoj denove alfrontiĝis en la ĉefurbo Tegucigalpo p. 03*

## Tunizio: flava karto adresita al la registaro
*Tunizianoj defiladis por protesti kontraŭ la leĝo pri ŝtatbuĝeto p. 03*

## Nek pedalo, nek stirrado – jen la aŭtomobilo *Cruise AV*
*La unua senŝofora aŭto serie produktata p. 04*

## Hodiaŭe
*Arsen Kocojev; Franz Grillparzer; Mihai Eminescu; Molière; Stanisław Wyspiański; kaj Usono p. 04*

## Domo de vic-reĝo aŭ Kiom kostas sendependeco?
*Nobla ideo aŭ komplika realo p. 06*

## Honduro: streĉiteco daŭras

Kontraŭ-ribelaj policistoj kaj manifestaciantoj denove alfrontiĝis en la ĉefurbo Tegucigalpo, sur fono de kontestado de la rezultoj de la prezidenta baloto, kiu finatingis reelektadon de la konservativa prezidento Juan Orlando Hernandez.



La opozicio kondamnas la balotan fraŭdon, kaj postulas la venkon de la centra-dekstra kandidato, Salvador Nasralla, kiu fariĝis simbolo de la kontestado:

«Ni ripetas hodiaŭ tion, kio okazos senfine kaj ĉiutage ekde sabato la 20-a de januaro en la tuta lando, kaj ni alvokas la popolon kuniĝi en ĝenerala striko».

Stelulo de la televido en Honduro, Salvador Nasralla opinias, ke lia venko estis ŝtelita de li dum la prezidenta baloto de novembro, kvankam la partaj rezultoj donis al li pli grandan nombron da voĉoj. Sed la kalkulo estis interrompita pro «informadikaj paneoj», laŭ la balota Ĉeftribunalo, kiu finfine anoncis la venkon de la eliranta prezidento, kun ĉirkaŭ 1,5 poentoj da diferenco. De post la baloto, violento okazigis tridekon da mortintoj en tiu lando, gangrenata de krimeco.

Neniam Milito Inter Ni

## Tunizio: flava karto adresita al la registaro

Svingante flavajn kartojn adresitajn al la registaro, tunizianoj defiladis por protesti kontraŭ la leĝo pri ŝtatbuĝeto 2018, kaj ties rigorecaj aranĝoj. Kunigitaj sub la flagrubando de movado nomata «Kion ni atendas?», proksime de la Popola fronto – opozicia partio – ili kondamnis ankaŭ la prezaltiĝojn kaj la mankon de laborpostenoj.




«Ni manifestacias tute pace kaj tute malkaŝitaj, ekkrias Rahma, juna manifestaciantino. Ni kontraŭas tiun leĝon. Ni ne alvokas al la faligo de la registaro aŭ de la reĝimo. Ni alvokas al nuligo de la klaŭzoj de tiu leĝo, kiuj estas maljustaj, kaj kiuj enkondukas novajn impostojn por la tuniziaj civitanoj».

Dum proksimiĝas la sepa datreveno de la faligo de Ben Ali, la kolero ekstariĝis pro la elrevigitaj esperoj. Kaj se la tumultoj okazantaj de lundo [08 jan 2018] kvietiĝis en la nokto de vendredo ĝis sabato [12-13 jan 2018], la firmeco afiŝata de la aŭtoritatoj ŝajne ne sufiĉos por bremsi la movadon. La polico arestis pli ol 780 personojn nomante ilin rompistoj kaj rabistoj.

Neniam Milito Inter Ni

# Nek pedalo, nek stirrado – jen la aŭtomobilo *Cruise AV*

Vendrede la 12-an de januaro la multnacia fabrikkompanio *General Motors* prezentis la aŭtomobilon *Cruise AV*, kiu estas konsiderata de la anoncinto kiel la unua senŝofora aŭto serie produktata, enhavanta nek pedalon, nek stirradon.



Tiu fabrikanto asertis, ke ĝi petis al la usona registaro permeson por agadi per tiu aŭto surstrate ekde la jaro 2019-a. La propono konsistas je ofertado de transporta servo same tiu fare de la firmao *"Uber"*. Tamen GM ne klarigis, ĉu kune kun la pasaĝeroj estos iu ĉe la veturilo.

"Oni ne bezonas eviti alkholoan trinkadon antaŭ la veturo, nek estas uzata poŝtelefonaparato dum stirado; la veturilo nek malfeliĉas aŭ laciĝas, ĝi neniam malatentiĝas, kaj ne produktas gasojn", tion asertas komunikaĵo.

Ĝis nun nenia kompanio surmerkatigis veturilon tute senŝoforan.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

---



## Arsen Kocojev

**Arsen Kocojev — osete Коцойты Арсен — (naskiĝis 15 jan 1872 apud *Vladikavkaz*, mortis 4 feb 1944 en *Vladikavkaz*) estas grava oseta verkisto, unu el la fondintoj de osetlingva beletra tradicio.**

**Vikipedio**

---

## Franz Grillparzer



**Franz Grillparzer [franc GRILparcer] (naskiĝis la 15-an de januaro 1791 en Vieno, mortis la 21-an de januaro 1872 samloke) estis aŭstria dramverkisto.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**



## Mihai EMINESCU

**Mihai EMINESCU [mihaj' eminesku] (realnome Mihai EMINOVICI; naskiĝis la 15-an de januaro 1850 en *Ipote;   ti*, norda Moldavio; mortis la 15-an de junio 1889 en Bukareŝto) estis rumana poeto.**

**En Esperanto aperis: *Luĉifero; Eminescu en Esperanto*.**

**Vikipedio**


## MOLIÈRE



**Jean-Baptiste POQUELIN, alinomita MOLIÈRE [mɔljɛʁ] kaj MOLIERO en esperanto (naskiĝis en Parizo, estis baptita la 15-an de januaro 1622, mortis la 17-an de februaro 1673 en Parizo), estis franca dramaturgo kaj komediisto.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**



## Stanisław WYSPIAŃSKI

**Stanisław WYSPIAŃSKI (naskiĝis la 15-an de januaro 1869, mortis la 28-an de novembro 1907) -pola verkisto, poeto, dramisto, pentristo kaj grafikisto de Juna Pollando.**

**En Esperanto aperis: *Protesilas kaj Laodamia; Fragmentoj de La nupto*.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Rapidtrajno «*Altamont Commuter Express*» traveturanta la nacian naturrezervejon Don EWARDS de la golfo de San Francisko, inter *Fremont* kaj *San Jose* en Usono.**

**Vikipedio**

# Domo de vic-reĝo aŭ Kiom kostas sendependeco?

Sendependeco aŭ bonfarto, nobla ideo aŭ komplika realo – tiel oni povas vortumi dilemon, kiu ne havas definitivan solvon. La filmo "*Domo de vic-reĝo*" esploras ĝin je ekzemplo de Brita Hindio, kies sendependiĝon akompanis divido je du ŝtatoj – Barato kaj Pakistano.



**Amara divorco**

Sian titolon la filmo ŝuldas al lordo MOUNTBATTEN, la lasta vic-reĝo de la kolonio, kiu venis al Delhio en 1947 kun unika tasko – prepari ĝian separiĝon de la Brita imperio. Bela palaco, helpema servistaro, ekzota kulturo – lia familio ĝuas la novan loĝlokon. Tamen en tiaj aferoj nenio iras laŭplane.

La sendependiĝonta nacio estas dividita je du malamikaj frakcioj – la hinduoj kaj islamanoj. La reciprokaj malkredo kaj malamego, dum jarcentoj flegataj de la koloniistoj, donis abundan rikolton – sojle de la longe atendata liberiĝo ili volas separiĝi ne nur de la iamaj sklavigantoj, sed ankaŭ unu de la alia. La komunumaj gvidantoj – ambicia Jawaharlal NEHRU kaj malcedema Muhammad Ali JINNAH – ne kapablas interkonsenti pri io ajn, speciale la lasta, kiu persiste postulas fondon de la "lando de la puraj" (Pakistano). Eĉ la grandspirita Mahatma GHANDI vane klopodas trovi mezan vojon, parolante pri "beleco de la kompromisoj".

Sed ĉion decidas eĉ ne la politikistoj, sed popolamasoj, en kies koroj jam brulas malamego, ĉi-foje direktita kontraŭ siaj najbaroj. Tra la lando ruliĝas ondo de pogromoj, en kiuj pereas miloj da homoj. Riveroj da sango fluas tra la kolonio, urĝigante al la tuja solvo. La vic-reĝo kapitulacas antaŭ la neregeblaj eventoj kaj aprobas la dividon. Anstataŭ fakulon, Londono sendas ŝtatoficiston kun nulaj spertoj, kiu malfacile orientaĝas eĉ sur la mapo. Sed ĝis la anoncita dato restis nur du monatoj, do restas nur fari ĉion eblan...

Oni scias, ke la geedziĝoj estas feliĉaj, sed la divorcoj amaraj kaj ofte kverelaj, do oni povas imagi kio akompanas disiĝon de la du nacioj. La landlima linio dishakas vivan organismon, separante vilaĝojn, arbarojn, havaĵojn kaj familiojn. Ĉiu servisto de la vic-reĝo devas elekti en kiu ŝtato li loĝos, do etnoreligia identeco iĝas la unuaranga afero. Oni dividas meblojn, telerojn kaj eĉ bibliotekon, inkluzive la Britan enciklopedion – volumenoj de la 1 ĝis # iros al Barato, dum la aliajn prenos Pakistano. Kiu deziras pli da kruelaj detaloj, legu "*El Nigraj marĝenoj*", rakontaron de la pakistana verkisto Saadat Hasan MANTO, publikigitan en *Beletra Almanako* N 15 (vidu).

Sur tiu ĉi fono disvolviĝas persona tragedio de du geamantoj – islamana servistino Alia kaj hindua servisto Jeet. Familio de la lasta pereas en masakro, ebeniginta lian vilaĝon. Lia amatino decidas veturi kun sia malsana patro al la novkreota Pakistano, sed sekvan tagon Jeet ekscias ke ilia trajno estis haltigita de hinduaj naciistoj kaj ĉiuj pasaĝeroj murditaj...

En la lasta sceno li tamen trovis sian amatinon –

post longa serĉado, en rifuĝejo por la hinduoj, de kie oni postulis forporti ŝin al tiu islamana. La du koroj reunuiĝis dum la landoj disiĝis por ĉiam.

Alia bato trafis la koron de la vic-reĝo mem. Fine li hazarde eksciis, ke la disiga plano estis desegnita antaŭlonge, subestre de Winston CHURCHILL, kiu esperis per la bufro-ŝtato Pakistano apartigi Baraton de Sovetunio, kies ligoj kun la sendependiĝonta lando tro fortaj. La lordo komprenas ke li kaj milionoj da loĝantoj de la Brita Hindio estis nuraj peonoj sur la granda geopolitika ŝaktabulo. Blokado de la malica komunista reĝimo estis konsiderata pli grava ol suferoj kaj mortoj de ordinaraj homoj.

**Kiom kostas la sango?**

Oni povas diskuti pri historia ĝusteco de la filmo. Sed mi volas atentigi pri tute alia, nerefutebla afero – ĉiuj disiĝoj kostas. Ili kostas multe. Kaj tiujn kostojn pagas ne politikistoj, kiuj iniciatas kaj plenumas ilin, sed ordinaraj homoj. Mirinde, sed post jarcentoj da sperto kaj milionoj da mortoj tiu simplega ideo mankas al la amasa konscio.

La amasa homo ĝenerale emas aliĝi al grego – ne gravas al kiu. Plej ofte tion influas hazardaj faktoroj kiel familia tradicio, eduko aŭ ĉirkaŭaĵo. Iuj subtenas dekstran ideologion, konsiderante "fortan manon" sola bazo por la nacia bonfarto. Aliaj inklinas al liberalismo, kun la sama fervoro kontraŭante iujn ajn limigojn. Observantoj foje miras kiel rapide homamasoj ŝanĝas siajn poziciojn – la Nazia Germanio estas tipa ekzemplo, sed iom malpli drastan politikan migradon oni povas vidi eĉ nuntempe.

Tio okazas, ĉar plejparte homoj pensas ŝablone, preferante ricevi ideojn pretaj kiel hamburgeroj anstataŭ kuiri memstare en sia kapo. Kolekti faktojn, analizi, konkludi – por kio tiom da peno, se eblas simple ŝalti televidilon aŭ malfermi retpaĝon?

Oni detale esploris tian konduton surbaze de la totalismaj reĝimoj (relegu verkojn de George ORWELL), sed ĝi ne malpli propras al la tiel nomataj "demokratiaj landoj" kaj homoj, kiuj konsideras sin liberaloj. Ili plenigas siajn paĝojn en sociaj retoj per ŝablonaj alvokoj kiel "Liberigu Palestinon!", "Liberecon al Tibeto!" ktp. Sed ĉu malantaŭ tiuj sendube noblaj animmovoj staras almenaŭ iom da scio? Ĉu ili vere scias ion pri la menciitaj konfliktoj, havas ideojn pri ilia solvo kaj certas, ke tio ne kaŭzos pli da sufero? Mi forte dubas.

Ĉiutage mi vidas kiel tiaj liberemuloj publikigas novaĵojn pri plia palestinano, mortigita de la israela polico. Sed neniam ili mencias, ke antaŭ esti mortpafita li mem pafis kontraŭ civiluloj aŭ ponardis homojn surstrate.

Foto de bela knabino kun mankatenoj inundas la sociajn retojn. Sed kial oni ignoras filmetojn, en kiuj same ĉarmaj knabinoj krias: "Tranĉu gorĝojn al la judoj! Eksplodigu la busojn!" kaj ĝoje dancas, festante morton de virino, ponardita en sia domo antaŭ okuloj de siaj tri infanoj, fare de "kuraĝa liberecbatalanto"?

Post ĉiu eksplodo fare de ĉeĉenaj teroristoj mi alfrontis strangan (por mi) reagon eĉ de eŭropaj esperantistoj, kiu ĝenerale vortumeblas tiel: "Bedaŭrinda afero, sed tion kaŭzas daŭra subpremado de la ĉeĉena popolo. Liberigu Ĉeĉenion!"

Vane mi klarigis, ke Ĉeĉenio jam estis tute libera de 1991 ĝis 1995 kaj de 1996 ĝis 2000, sed anstataŭ konstrui normalan vivon ĝiaj loĝantoj kreis novan Somalion, kie oni ŝtonumis homojn laŭ leĝoj de ŝario, torturis ŝtelitajn homojn kaj ĉiujare aranĝis futbalmatĉon memore al la "glora evento" – ostaĝigo de mezlernejo de la kaŭkaza

urbeto Beslano, kie pereis 334 homoj, inkluzive 186 senkulpajn infanojn. Venkinto estis premiata per bombokanono. Ĉu sango de la osetaj (eĉ ne rusaj!) infanoj estas malpli kosta ol tiu de la ĉeĉenaj islamistoj? Sed responde aŭdiĝas nur obtuza muĝado: "Rusio estas la lasta imperio... liberigu popolojn...".

Mi supozas ke plejparte temas pri naivuloj, kiuj vere kredas ke la popoloj de Rusio revas pri sendependiĝo kaj "libereco", kiu alportos al ili feliĉan vivon – ja ĉia liberiĝo feliĉigas. Sed ĉu ili scias kio akompanis ekzemple disfalon de Sovetunio? Militoj kaj masakroj, kies sangaj spuroj ne malaperos eĉ post jardekoj.



Uzbekoj masakris turkojn en Fergana valo. Kirgizoj buĉis uzbekojn en urbo Oŝo kaj apude. Azeroj faris amasan pogromon en Bakuo, murdinte dekojn da siaj armenaj najbaroj.

En la fakte sendependiĝinta Ĉeĉenio de 1991 ĝis 1995 okazis granda etna elpurigo dum kiu estis buĉitaj aŭ forpelitaj preskaŭ ĉiuj neĉeĉenaj loĝantoj – rusoj, judoj, germanoj, ukrainoj, tataroj. Stulta naciismo de la kartvela registaro sekvigis kruelajn militojn en Sud-Osetio kaj Abĥazio, sekve de kiuj tiu kaŭkaza landeto perdis grandan parton de sia teritorio.

En Ĉednestrio nur enmiksiĝo de la rusia armeo haltigis militon inter tiu plejparte rusparolanta regiono kaj la moldava registaro. En Taĝikio eksplodis kruela enlanda milito inter la sudaj kaj nordaj klanoj. Milito en Montara Karabaĥo flamegis dum jaroj – kun masakroj kaj etnaj elpurigoj. La konflikto en Ukrainio daŭras ĝis nun, malgraŭ ĉesigo grandaj bataloj.

Kun granda peno Rusio sukcesis preventi propran disfalon, kies sekvoj povus esti vere katastrofaj. Sed por tio ĉiutage batalas en Norda Kaŭkazo militistoj kaj specialaj servoj (plejparte lokanoj, ĉar rusoj tre malmultas en la regiono) por ke islamistoj ne establiĝu tie, realiginte sian revon pri Islama Ŝtato, ĵus frakasita en Sirio.

Mi povus daŭrigi per aliaj ekzemploj – ekzemple Jugoslavio, sed ĉu tio vere necesas?

**Liberecon al Uagamorduo!**

Sed kial? Mi jam parte respondis al tiu demando, sed jen du plej gravaj klarigoj – unu politika kaj alia psikologia.

Kiu regas la amaskomunikilojn? Elitoj. En la totalismaj ŝtatoj temas pri registaroj, en la "demokratiaj" – pri grandaj entreprenoj, proksimaj al la influaj politikaj fortoj. Ĉu vi vere kredas ke tiuj homoj, loĝantaj en tute alia universo, interesiĝas pri bonfarto de la tibetaj kamparanoj aŭ ukrainaj rifuĝintoj? Ĉu vi havas ekzemplojn de tia konduto?

Rigardu pli atente kaj vi vidos la saman politikan ludon, kiun lordo Mountbatten rimarkis antaŭ 70 jaroj. Okcidentaj elitoj subtenas "liberigan movadon" de Tibeto, ĉar tio ebligas almenaŭ iom bremsi Ĉinion, kies politika, ekonomia kaj milita kresko maltrankviligas ilin. Ili favoras la ĉeĉenajn "liberecbatalantojn", ĉar tio estas unu

el malmultaj vojoj influi Rusion kun ĝia sendependa politiko. Bedaŭrinde por ili, post la islamistaj atakoj en Eŭropo malpli facilas klarigi al la civitanoj, kial ili devas subteni la ĉeĉenajn teroristojn dum persekuti iliajn eŭropajn kamaradojn.

Kiam kontraŭregistaraj manifestacioj inundis Kievon, la eŭropaj registaroj postulis forigi de la stratoj policon, malgraŭ nekaŝeblaj pruvoj de perforto fare de la protestantoj. Sed kiam la hispana polico brutale batis pacajn homojn en Katalunio, la samaj eŭropaj registaroj deklaris ke temas pri la “interna afero” de Hispanio – malgraŭ pluraj fotoj kaj filmetoj, montrantaj senprovokajn kruelaĵojn. La diferenco estas simpla – por la okcidentaj elitoj estis grave kapti Ukrainion kiel bufroŝtaton, premilon kontraŭ Rusio. Tute kontraŭe, la sendependiĝo de Katalunio damaĝus iliajn ekonomiajn interesojn, do la kataluna sango verŝita surstrate iĝis malpli ruĝa ol tiu ukraina.

La plej amuza afero en tiu farso estas ke la plejparte maldekstremaj liberemuloj estas manipulataj de la dekstraj elituloj. Ili konsideras sin ribelantaj kontraŭ la sistemo dum en realo ili restas nuraj pajlopupoj, kiuj dancas, ploras kaj ridas laŭ deziro de siaj mastroj. Hipokriteco kaj duoblaj normoj regas la mondon dum la obeema ŝafaro manĝas la proponitan al ĝi idean furaĝon kaj muĝas laŭordone: “Liberecon al [metu la nomon]!”

La dua kialo estas pure psikologia kaj oni povas ilustri ĝin per eksperimento, aranĝita de *The Washingtone Post*. En 2014, kiam la ukrainia krizo atingis apogeon, tiu usona ĵurnalo, apenaŭ suspektebla en simpatioj al Rusio, faris enketadon, kiu inkluzivis peton montri la situon de Ukrainio sur la mondomapo kaj demandon pri kiom forte Usono devas engaĝi en tiu ĉi afero.

Nur 16% de la enketitoj ĝuste respondis al la unua demando. Plejparto montris al la grandega spaco, kies limoj atingis Portugalion okcidente, Kazaĥion oriente, Finnlandon norde kaj Sudanon (!) sude. Tamen tiu geografia malklereco, tiom propra al la usonanoj, apenaŭ estus speciale atentinda se ne tre interesa korelacio, rimarkita de la enketantoj. Ju pli nebulaj estis la konoj de la enketito, des pli rigora estis lia politika vidpunkto. Do la plej fortan enmiksiĝon de Usono en la ukrainia krizo postulis homoj, kiuj eĉ ne sciis kie troviĝas tiu ĉi lando!

Mi certas, ke la saman rezulton oni havus kun Ĉeĉenio, Tibeto, Palestino ktp., sed proponas alian eksperimenton. Oni verku peticion pri liberigo de iu imagita lando, ekzemple Uagamorduo. Publikigu ĝin en iu subskribkolekta retejo, kiuj abundas nun kaj lanĉu kampanjon tra la sociaj retoj. Kredu min, jam morgaŭ oni havos milojn da subskriboj, republikigoj kaj komentoj kun ardaj postuloj – Liberecon al Uagamorduo! Kiam pensoj malmultas, la vortoj venas rapide...

Kiel rompi tiun ĉi cirklon? Tre simple – pensu memstare. Kolektu informojn, analizu kaj faru vian propran konkludon. Interreto donis al ni facilan aliron al neimageble vastaj informofontoj, necesas nur uzi la eblecon. Temas pri temporaba kaj komplika afero kun rezulto ne garantiita, sed tio estas neevitebla pago kontraŭ la vera libereco.

Stano Belov
stanobelov.blogspot.com